# SUDFRANCA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc-Roussillon »


*5, Quai Vauban* — **66 - PERPIGNAN** — *Telefono 34-38-84*

N° 28 -------- Jara Abono : 2 F. ---------- 1 a Trimonato 1968 -------

Speciala Numero 7 Mar. 68 C.C.P. 956 28 Montpellier.


ooooo

LA TURO DE " CONSTANCE " en AIGUES-MORTES.



Estas la reĝo Sankta Ludoviko kiu konstruigid la turon de " Constance " antaŭ sia foriro al la 7a krucmilito. Ĝi estis finkonstruata ĉirkaŭ la jaro 1250. Unuatempe ono nomis ĝin : " Dika fortika turo " poste ekde la XV jarcento Turon de " Constance " sed oni neniam trovis en la arkivoj klarigojn pri tiu-ĉi nomo.

La turo staras grandege, majeste iomete for de la N.Ok. angulo de la remparoj. Ĝi estas 34 metrojn alta kaj 22,5 metrojn diametra. Ĝiaj muroj estas 6 metrojn dikaj.

La tuto konsistas el tri ĉambregoj kun teraso sur kiu staras ankoraŭ gvatturo. Ĉe ties supro estis lanterno protektata de kradaĵo kaj en kiu oni brulligis lignaĵon por montri al la ŝipestroj kie kuŝas la haveno.

Oni eniras en la turo trairinte tri-arkaĵan ponteton tridekmetrojn longan kaj oni tuj estas en la ĉambrego de la unua etaĝo t,n. " Ĉambrego de la gvardistoj." En la mezo estas cirkla aperturo : la ununura alirejo al la teretaĝo; la tiean ĉambron oni uzis kiel magazenon por provizaĵoj kaj eble ankaŭ kiel karceron. En la unuaj tempoj la enirpordo situis kontraŭ la nordo. Ĝi estis ŝirmata de ligna barokrado. De longe tiu pordo estas masone fermita. La ĉambrego de la gvardistoj estas 10 m diametra kaj 12 m alta. Taŭge aranĝita en okazo de sieĝo ĝi enhavas panbakujon, puton kiu liveris trinkeblan akvon kaj cisternon por kolekti pluvakvon. Spiralforma ŝtuparo entenata en la murdiko kondukas laŭ 190 ŝtupoj al la teraso. Supreniirante oni renkontas kontrolirejon kiu superstaras la ĉambregon de la gvardistoj kaj plifortigas la defendsistemon.

La duetaĝa ĉambro estas la ĉambro de la kavaliroj aŭ de la kalvinanaj malliberuloj. Ĝi estas samvasta kiel la suba. Antaŭ ol eniri en tiun ĉambron oni trairas arkaĵan vestiblon kun kolonetoj superitaj de delikate skulptitaj kapiteloj. La tradicio donas al tiu vestiblo la nomon " Preĝo-ĉambro de Sankta Ludoviko " kaj tiu nomo ŝajnas tute prava.

La turo de Constance ne longtempe restis reĝorestadejo . Cetere post Sankta Ludoviko la francaj reĝoj tre malofte kaj mallonge restadis en Aigues-Mortes.

Ekde 1307 oni uzis ĝin kiel ŝtatmalliberejon. Dum la XIVa kaj XVa jarcentoj reĝaj princoj estis tie enkarcerigataj. Dum la XVI a la kalvinanoj pli potencaj en Aigues-Mortes enkarcerigis la urbmagistratojn en la teretaĝa ĉambro. Dum la XVIIIa post kiam la reĝo Ludoviko la XIVa nuligis la "Edikton de Nantes " protestantaj virinoj kaj fraŭlinoj estis en malliberigataj dum multaj jaroj. Unu el ili " Marie Durand " gravuris sur la ŝtono la vorton : " RESISTER " = Rezisti.

ooOoo

O

<u>FEDERACIA KONGRESO "LANGUEDOC-ROUSSILLON</u>

Ĝi okazos la dimanĉon 7an de aprilo je la 10a en la junuldomo de AIGUES-MORTES ( Gard ). Strato Theaulon

La organizantoj de la kongreso deziras ricevi kiel eble plej precizan informon pri la nombro de partoprenontoj.

Vi bonvolu respondi al la ĉi-subaj demandoj.

Nomo :..................... Adreso ..............................

Kiom da personoj partoprenos la komunan manĝon ?............

(Prezo : 12 F. Vino kaj trinkmono enkalkulitaj )

Kiom da personoj kunportos sian manĝaĵon ?...................

Tiujn klarigojn ( precipe pri la komuna manĝo ) oni devas sendi al : " Groupe Esperanto, 4 Rue Chotard 30 ALES antaŭ la 31 de Marto.

Por doni al la kongreso plej grandan sukceson, la kursgvidantoj klopodu venigi siajn gelernantojn. Ne forgesu la flagojn aŭ flagetojn.

PROGRAMO :

Je la 9a 45 : Akcepto en la kongresejo.
10a : Kongreso. Agada raporto kaj financa raporto. Projektoj. Diversaj temoj.
12a 30 : Foto.
12a 40 : Tagmanĝo en restoracio " La Peniche " Avenuo de la Stacidomo. Prezo : 12 F.

Eblece manĝi sian kunportitan manĝon en apuda ĉambro ĉe kafejo " " Glacier ".

Postagmezo : Estrarkunveno kaj vizito de la turo de "Constance " Remparoj, k.t.p.

ooooooo
ooo

ENIGMO :

Elprenu el ĉiu suba vorto unu literon tiel ke la restintaj literoj, lasitaj en siaj antaŭaj lokoj, formu novan vorton. La elprenintaj 22 literoj prezentos al vi, kio estas via devo.

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| 1. ALUDI | 5. MUELO | 9. RESTI | 13. ABONO | 17. PENDI | 21. LAIKO |
| 2. PIANO | 6. SPINO | 10. PENTI | 14. TENTI | 18. REAGI | 22. PENTO |
| 3. BALGO | 7. MARTO | 11. LAKEO | 15. ORELO | 19. SVENI | |
| 4. ULULI | 8. AORTO | 12. PASKO | 16. RENTO | 20. VAKSO | |

ooooo

GRAVA OKAZAĴO EN NIA REGIONO

60° Nacia kaj Jubilea Kongreso de Esperanto 12-16a de aprilo 1968 en AIX-en-PROVENCE.

Ni festas la 70an jaron de la vivo de nia nacia unuiĝo U.F.E. Ĝi estas la plej malnova esperantista nacia asocio.

La programo de la kongreso estas tre alloga. Multaj famaj eksterlandanoj ĉeestos.

Rapide aliĝu skribante al ; Foyer Culturel Esperanto 28 Rue Portales 13 AIX en PROVENCE.

ooooooo

VIVO DE LA GRUPOJ :

NIMES

La Turisma Oficejo ĵus eldonis esperantan dokumenton pri la urbo, fama pri romiaj monumentoj.

Bonvolu peti sendon (senpage) al Syndicat d'Initiative 30 NIMES.

NIMES ( Daùrigo )

La urbestro laù nia peto donis la nomon de D-ro ZAMENHOF al strato de nova kvartalo de nia urbo : Quartier du chemin-Bas d'Avignon.

La Kultura Esperantista Rondo intencas aranĝi solenan inaùguron de tiu strato la Dimanĉon 5 an de Majo.

Ĉiu esperantisto, kiu trapasos nian regionon en tiu tago estas kore invitata ĉeesti tiun ceremonion je la 10a.

NARBONNE

La E. Grupo kunvenas ĉiujn unuajn ĵaùdojn de la monato de la 18a ĝis la 19a horo en la urbdomo, salono de presejo kaj arkeologio.

Novembro :Elsondoj kaptitaj sur sonbendoj kaj kantoj.

Decembro : Vivo de Esperantisto Jules VERNES, Prezidanto de la grupo de Amiens en 1905.

Januaro : Vivo de Hodler.

Imitinda rezulto :

La sekvantan sabaton aperas en loka ĵurnalo " l'Independant " sufiĉe longa artikolo pri la kunveno.
Bona malrekta propagando !

AGADRAPORTO PRI LA JARO 1967

La esperantista Federacio "Languedoc-Roussillon" konsistas el la Grupoj de Alès (Gard), Beziers (Herault), Montpellier (Herault), Narbonne (Aude), Nimes (Gard), Perpignan (Pyrenées-Orientales).

La respondeculoj klopodis, dum 1967, precipe pri la publikaj kaj lernejaj kursoj. Kelkaj inter ili prelegis en diversaj lernejoj kaj liceoj por varbi novajn junajn aliĝontojn.

Oni ankaù organizis ekspozicion pri la "Libro Esperanto" en pluraj urboj de la Suda Francujo, kaj akceptis eksterlandanojn el Hungario, Nederlando, Germanio, Aùstralio, Moritanio, k.t.p. kiuj prelegis pri sia lando.

La dimanĉon, 16an de aprilo, okazis en Narbonne nia jara Federacia kongreso. Post la agada kaj financa raportoj, la ĉeestantoj elektis la ĉi-suban estraron :

Prezidanto : S-ro René LLECH-WALTER, Perpignan

Sekretariino : F-ino Anna VIDAL, "

Kasisto : S-ro Lucien ANGEVIN, Le Cailar.

Ni devas gratuli precipe la Montpellieran grupon kies multaj membroj

BULLETIN D'ADHESION AU 60ème CONGRES NATIONAL D'ESPERANTO

NOM .......................................Pronom.........................

Adresse.................................................................

Accompagné(e) de ................membres de sa famille.

Cotisations : Congressiste : ........... 12 F .........................

Famille : ............... 6 F .........................

Etudiant : ............... 6 F .........................

Morale : ................ 8 F ( de soutien)..........

Banquet du dimanche (18 F.) ...............................................

Excursion du lundi après-midi (10 F.).....................................

Excursion du mardi, complet (30 F.)......................................

repas seulement (18 F.).........................

Arrhes pour la reservation des chambres ( prix d'une nuit ) .......

Le congressiste désire ...... fichets de réduction de S.N.C.F.

TOTAL : ..............................

La somme ci-dessus doit être envoyée au Compte Postal : Foyer Culturel d'Esperanto, 2307-04 Marseille. 28 rue Portalis 13 Aix-en Provence

Logement :

Arrivée : Le ............. à ................ heures.

Depart : Le ............. à .................heures.

A retenir :

...........Chambre(s) 1° catégorie pour ..... Personne(s) à.....F.env.

...........Chambre(s) 2° catégorie pour ..... Personne (s)à.....F.env.

...........Chambre(s) 3° categorie pour ..... Personne(s) à.....F.env.

Places Maison des Jeunes : avec literie :(6.F)...........................

sans literie :(4.F)...........................

Désirs particuliers : Signature.

ooooooooo

Daŭrigo de la paĝo 4.

kotizis al "SudFranca Stelo " kaj tiel permesis daŭrigi la publikaĵon de nia federacia bulteno. Ni esperas ke dum 1968 la aliaj grupoj faros same kiel Montpellier por ke la Federacio daŭrigu sian agadon por la estonteco de nia internacia lingvo.

R.L.W.

# FINANCA RAPORTO DE 22 MAJ 67 ĝis 31 DEC 67.

ENSPEZOJ

| | |
|---|---|
| Enhavo la 22an de Majo 67 | 10 |
| Kotizoj | 40 |
| Abonoj al SudFranca Stelo | 0 |
| Manifestacioj | 43,14 |
| Vendo de Materialo | 2 |
| Sumo | 95,14 |

ELSPEZOJ

| | |
|---|---|
| Kotizoj | 00 |
| Bulteno | 61,66 |
| Sekretario | 12,20 |
| Aĉeto de materialo | 2 |
| Sumo | 75,86 |
| ENHAVO la 31an de Decembro 67 | 18,28 |

ooooooo

o

POR INFORMO : Financa stato la 15an de Februaro

ENSPEZOJ

| | |
|---|---|
| Enhavo la 1an de Januaro | 18,28 |
| Kotizoj | 1018,50 |
| Abonoj al SudFranca Stelo | 191,00 |
| Sumo | 1227,78 |

ELSPEZOJ

| | |
|---|---|
| Kotizoj | 942,50 |
| Bulteno | 84,30 |
| Sumo | 1026,80 |
| Enhavo la 15an de Februaro | 200,98 |

L.ANGEVIN.

Directeur de la Publication : Lucien ANGEVIN
Rédaction & Administration, Imprimerie :
Rue Bernard Lazare 30 Le Cailar.